

kun la titolo »Plena Gramatiko«. — Jam mi havis skriban diskuton kun samideano pri titolo de rakonto (tradukaĵo de alia samideano). La titolo tekstis: »La malkuraĝa porko«. »Ĉu ne sufiĉus skribis al mi la diskutanto — **Malkuraĝa porko?**« Jes, mi respondis, se la aŭtoro volus tion esprimi, t. e. se li volus paroli pri iu nekonata, ebla, hipoteza malkuraĝa porko, sed li volis rakonti pri tre specifa kazo, pri **la malkuraĝa porko** de l'kampulo K. kaj tial li uzis la artikolon. — Similan kazon komunikis al mi P. Lobut jene: ... Titolinte tradukon el Baudelaire »La Burleskulo kaj la Venuso«, mi havis la surprizon trovi la artikolon forstrekita de redaktoro antaŭ »Venuso«, dum ne temis pri la diino (tiukaze nature ne artikolon!) sed pri statuo, kaj en la titolo oni devis do subkompreni »... kaj **la statuo de Venuso**.«

Kio pri korpopartoj? Ĉe korpopartoj, »la« antataŭas personan pronomon, do ĝi aludas aŭ al la koncerna korpoparto de la parolanto, aŭ al tiu de la alparolato, aŭ al tiu pri kiu oni parolas, aŭ pri la korpoparto ĝenerale (nia, niaj). Ĉiam ni povas anstataŭi ĝin per poseda pronomo. Kiam ni uzas la korpopartojn sen artikoloj, temas do — laŭ la strukturo de nia lingvo — pri io nedefinita. »Okuloj povas esti bluaj« (iuj okuloj).

Pri la ekzemploj en la Fundamenta Ekzercaro (Vaitilaviĉius mencias: »La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka«), oni ne pretervidu, ke laŭ la modo de la tiamaj lernolibroj, ili povas esti senkontekstaj frazoj kaj oni subkomprene povus supozi, ke »la« aludas al antaŭa neeldirita frazo. Cetere, ĝuste pri »la papero« en la citita frazo ekzistas en la sama § 10 de la Ekzercaro frazo: »Blanka papero kuŝas sur la tablo«. Do »la papero« povas aludi al tiu papero kuŝanta sur la tablo, dum »la neĝo« aludas al »neĝo ĝenerale« (al la neĝo, kiun ni ĝenerale konas).

Ekzistas kelkaj gvidiloj por konsili nin, ĉu uzi aŭ ne la artikolon difinan. Kiam sence estus eble diri »tiu« (persono aŭ aĵo) »la« estas ĝuste aplikebla. Tion jam diris Vaitilaviĉius. Sed se »tiu« ne estas aplikebla, demandu vin, ĉu »iu« aŭ »iuj« estas aplikeblaj. Se ne, tamen prefere uzu: **la**, (se ne ekzistas alia difinilo: unu, pronomoj). Pli certa gvidilo estas la demando »kiu«. Se ĝi estas aplikebla, uzu: **la**. Kiu? La sinjoro, kiun mi ĵus renkontis. La malkuraĝa porko, pri kiu mi rakontos. La homo, kiun ni ĝenerale konas. Al slavo mi rekomendus: tralegonte denove viajn artikolojn aŭ leterojn, provu al ĉiu substantivo senartikola aldoni »iu« aŭ »iuj« kaj vi tuj vidos, kie mankas la artikolo difina.

Nu, mi scias, ke la jena artikolo ne elĉerpas ĉiujn kazojn, sed mi esperas, ke ĝi kontribuos iom al pli bona kompreno de tiu eta gramatik-aĵo, surbaze de la strukturo de nia lingvo.

413.141:408.92»715« (dekstra)

DEKS! LIV! DEKS! LIV!

(A. Albault*), Toulouse, Francio

Antaŭ kelkaj monatoj, okaze de enketo, kvankam flanke de ĝi mi estis surprizita de duobla kvazaŭ-respondo al... ne farita demando. Miaj Kolegoj Akademianoj Butler kaj Kawasaki, ambaŭ eminentaj leksikologoj, tiel same kaj egale esprimis sian ĝeneralan malfavoron al la »neologismoj«, SED ambaŭ tiel same kaj egale opiniis, ke escepto estu farita por du nocioj, nome por **malfermi** kaj **maldekstra!**

Elokventa sameco de opinio! Ĝis tiam mi ja opiniis, ke tiajn ĉi du neologismojn nia lingvo bezonas. Sed mi konsideris mian opinion kiel nure personan: eble influis mia novlatineco kaj mi eble emis retrovi en la internacia kutimojn de mia nacia lingvo? Tamen tia supozo ne plu estas tenebla, de kiam la sama opinio venas ankaŭ de Brito kaj precipe de Japano! Verŝajne tio respondas al io pli profunda.

Ankaŭ surprizis min, ke ambaŭ miaj korespondantoj esprimis sian malŝaton al la formo **aperti**, trovebla en pluraj vortaroj. Sed eble pro tio, ke temas pli ĝuste pri adjektivo **aperta**, kiu prefere signifas: »libere alirebla« (P. I. V.) kaj do normale **aperti** ne povas signifi **malfermi**, sed ja **esti aperta**. Pro tio estus pli bone uzi **ovri**, trovebla en la vortaro de Kawasaki kaj preferata de Butler; krom se oni volus per la formo **uvri** sekvi la proponon de Stojan en »La Deveno...«

* * *

Sed ni lasu tiun punkton kaj ni dediĉu nin al **maldekstra**, por kiu miaj korespondantoj konstatis, ke ni ne havas apartan formon.

Fakte kaj male, ni havas multajn proponojn por esprimi **maldekstra**: tre multajn! Tre kaj tro, kio egalas al nenio!

*) 32, avenue Etienne Billières

* * *

Se kaj kiam verkisto sentas bezonon de sinonimo (de »neologismo« laŭ la ĝisnuna misterminologio!), li hodiaŭ konsultas la antaŭulojn; tiuj jam trovis solvon, kaj trovis ĝin facile, ĉar ordinare ne eblis heziti. Tiel, iom post iom, kreiĝas pli-malpli klara tradicio, ĝis unu bela tago, kiam elstara aŭtoro uzas la vorton en bona verko; ĝi iĝas vaste konata: la publiko erare opinias ĝin nove kreita; ĉiuj verkistoj imite uzas ĝin; ĝi fine eniras la vortarojn sendiskute: kristaliĝis la uzado.

Ja tiel enkondukiĝis formoj, kiel heziti, avantaĝo, dura, pigra, kurta... Iuj personoj estas kontraŭ la uzado de tiaj sinonimoj, aliaj — por, en limigitaj cirkonstancoj. Sed, kaj jen la grava punkto, ĉiuj, kiuj sentas ilian bezonon, unuanime kaj senhezite uzas la samajn formojn: ili ja estas bone konataj! Ili ja estas troveblaj en la bonaj vortaroj. Mi diros pli kaj plu: ili estas konataj ankaŭ de iliaj dogmaj malŝatantoj! En kelkaj okazoj aperas hezito, kiel ekz-e ĉe **maldika: dina** ne plu estas uzata kaj nun ŝajne cedis la lokon al **minca**... Sed ĝenerale parolante, ni diru, ke malmultaj sentas la bezonon de sinonimo en tiu ĉi okazo: **maldika** plej ofte sufiĉas.

Ja ne estas tiel same por **maldekstra**! Unuflanke, multe pli da homoj sentas bezonon de sinonimo, aliflanke ĝis nun oni ankoraŭ ne povis adopti unu formon. La lingvanaro mem ankaŭ sentas la problemon. Sed multaj, se ĝenataj, alkalkulas tiun ĝenon al tio, ke ili ankoraŭ ne mastras la lingvon. Tamen tradukistoj kaj verkistoj pli akre kaj pli konscie sentas la urĝan neceson de solvo.

Se la popolo sentas ĝenon en la uzado de **maldekstra**, tio verŝajne estas klarigebla diversmaniere. La kelkaj lingvoj, kiujn mi konas, uzas du tute malsamajn radikojn por **dekstra** kaj **maldekstra**: verŝajne tio estas pli ĝenerala fakto! Due **dekstra** kaj **maldekstra** pli elvokas nocion de simetrio, kiel ekz-e **sudo** kaj **nordo**, ol de vera malo, kiel ekz-e **utila-malutila**, **bona-malbona** aŭ **larĝa-mallarĝa**, ĉe kiuj oni distingas krom la malon ankaŭ la negacion: **neutila**, **nebona** kaj **nelarĝa**; aŭ ankaŭ kiel ekz-e; **blanka-nigra**, **tago-nokto**, **forgesi-memori**... por kiuj Zamenhof donis apartajn radikojn. Trie oni jam emas konfuzi ambaŭ nociojn en la naciaj lingvoj, des pli en E-o, en kiu ili havas saman radikon!

Oni ne aldiru tie, ke en la praktiko konfuzo ne povus okazi, ĉar oni akcentus la prefikson (**mal-**)! Unue, oni ne ĉiam parolas; oni ankaŭ flustras aŭ kriegas... senakcente! Due, ĉu ni do proponu leĝigi miskutimon kontraŭ Fundamenta regulo? Trie, **mal-** povas anonci diversajn radikojn kaj jen plia fonto de eraroj!).

1) Okaze de akcidento, S-ro E. Malmgren skribis leteron (10 APR 65), kiu bone ilustras tiun punkton. El ĝi mi eltiras jenon:

Oni ankaŭ ne asertu, ke kiu funde konas la lingvon, ekz-e la denaskaj E-istoj, jam ne plu sentas la vorton kiel kunmetaĵon, sed kiel io tute aparta! Malbonega argumento, ĉar tio estas agnoski, ke en tiu ĉi okazo la kunmetiteco estas nek utila, nek taŭga. Aliparte, mi vee devas bedaŭri, ke se miaj tri infanoj estas denaskaj E-istoj, iil ja estas izolaj »meze« de miloj kaj miloj da ordinaraj E-istoj... kaj meze de kiom da milionoj da ordinaraj homoj?

Ni do konkludu tiujn konsiderojn kun Kawasaki: »tiu vorto ne estas rekte elvokiva kaj pro tio ĝi ofte donas konfuzon en la praktiko. Kompreneble mi tute ne proponas, ke ni ekstermu ĝin el nia lingvo, sed kiam ni volas havi pli da klareco, ni toleru (alian formon) en la komuna lingvo. Jam ekzistas en nia lingvo: **oriento-okcidento**. Neniu volas diri: **maloriento**, ĉu ne?»

Estis malhela vespero; unu el miaj E-o-amikoj veturigis min hejmen.


Nia aŭto **a** alproksimiĝis (sur strato **A**) al angulo. Mia amiko ekvidis preter la angulo unue la deklivan straton **C** kaj li plirapidigis por pli facile supreniri ĝin. Surprizita mi ekkriis: **mal-dekstren!**

Kiam mia amiko aŭdis **mal-**, li **malrapidigis**; feliĉe, ĉar sammomente aperis la aŭto **b** sur la strato **B**.

Lastsekunde mia amiko evitis kunpuŝiĝon kaj la aŭtoj ricevis nur etajn makulojn. La kaŭzo estis, ke mia amiko kredis, ke mi diros: **mal-rapide**, sed mi celis **mal-dekstren**.

En nia epoko de satelita kaj atoma rapidecoj necesas havi klarajn radikojn por la ĉiutagaj nocioj uzataj en la trafiko kaj en la laborejoj. La kontrastaj vortoj devas esti klare diferencaj. Ekz-e, **supren** kaj **suben** ne estas bonaj, ĉar oni klare aŭdas nur la u-sonon. Por **maldekstre** oni eble povus elekti **linkse** aŭ **sinistre** aŭ iun alian esprimon, kiu klare diferencigas de **dekstre**.

Mi ĝenerale ne ŝatas neologismojn, sed la supré dirita tuŝas la nepran bezonon de nia nuna ĉiutaga vivo.



(Tiam, en Svedio, la trafiko ankoraŭ okazis livafanke)

La diversaj proponoj aŭ uzoprovoj

Jen do listo, verŝajne tre nekompleta, de la diversaj proponoj aŭ uzoprovoj, kiujn ni estis bonŝancaj kolekti. Ni reproduktas la argumentojn de la iniciatintoj, parte aŭ tute, en la celo prilumi la problemon el plej diversaj vidpunktoj.

1. René de Saussure en la artikolo pri »La nasko de la internacia lingvo« (en la »Literatura Almanako de Lingvo Internacia, 1909« — p. 33—39) skribas:

Jam nun en la teknikaj vortaroj militistaj²⁾ oni proponas novajn vortojn anstataŭ **maldekstre**, **malantaŭe**, ktp. La kaŭzo estas, ke la ordonoj **dekstren**, **maldekstren**, **antaŭe**, **malantaŭe**, estas facile interkonfuzebaj. Oni do verŝajne enkondukos per la praktiko kelkajn novajn vortradikojn kiel ekzemple: **lefe** = = **maldekstre**; **postere** = **malantaŭe**.

Mi dankas prof. Waringhien pro la komuniko de franclingva poŝtkarto (25 DEC 08) de nia aŭtoro al prof. Cart, tiama redaktoro de »Lingvo Internacia«. Li i.a. tie skribas:

... mi intence metis la vorton **lefe**, por montri ke Couturat kaj B.³⁾ perfortas sian faman principon de internacieco.

La vorto **sinistre** estas nur latina kaj plie ĝi havas alian sencon en la franca; kontraŭe, **lefe** trafas ne nur la anglo-saksonojn kaj ĉiujn slavojn, sed ĝi ankaŭ estas pli mallonga kaj eĉ en la franca oni diras dextragyre kaj lévogyre. Ankaŭ mia frato, la lingvisto aprobas **lefe**.

2. En la unua eldono de sia »Dictionnaire Complet F. -Eo« (1910) Grosjean-Maupin notas sur la paĝo 201 kiel teknikan vorton: **sinistra** en la nura signifo de **maldekstra**.

Sed en la postaj eldonoj mankas tiu antaŭtempa novismo.

Cetere en la »Oficiala Gazeto« de 25 DEC 11 (p. 234) en »Materialoj kaj rimarkoj por helpi al kritika esplorado de la E-a vortaro« Boirac notas: **sinistra: ne necesa, ne bona**.

3. En la »Heroldo de Esperanto« (9 MAJ 1930; p. 6) aperas artikoleto de Ach. De Maetelaere el Gent, kiu proponas ne nur **linksa**, sed ankaŭ **reksa**.

²⁾ Verŝajne aludo al »Eo et Croix-Rouge« (Bayol) kaj la »Provo de Marista Terminaro« (Rollet de Lisle). — Vd. pkt. 15.

³⁾ Legu: Beafront.

El tiu interesa kaj spertoporta artikoleto ni eltiras jenon:

Farinte gimnastikajn ekzercojn per Esperanto-ordonoj mi spertis, ke mankas ĉu energiaj ekkrioj, ĉu teknikaj unusilabaj ordonvortoj en la Esperanto-vortaro.

Je ekmarŝado oni ordonas: »**Antaŭen! marŝu! Dekstre! Maldekstre! Dekstre! Maldekstre! Dekstre! Maldekstre! ... Maldekstren! ... Maldekstre!** ktp. La ritmo de tiuj vortoj estas danca, ne marŝa. Kiam oni ordonas per la nombroj: **Unu! Du! Unu! Du! Unu! Du!**, tiam la vortoj reproduktas la ritmon de l'marŝado de lamulo.

Post studado de la diverslingvaj ordonvortoj, mi trovis jenajn teknikajn vortojn, kiel plej taŭgajn kaj energiajn: »**En pozicio! ... Fiks! ... — Antaŭen! ... Marŝ! Links! Reks! Links! Reks! ... — Linksen! ... Links! — Reksen! ... Reks! — Haltu! ... Halt! — Saltu! ... Hop! — Ripozu!**«

4. En la »Parnasa Gvidlibro« (1932) troveblas la vorto **sinistra** kun jenaj du signifoj: **maldekstra**, **malbonaŭgura**.

5. C. Minor, L. K., skribas en la »Heroldo« de 5 DEC 37 (p. 4) jenon:

En sporta senco oni uzu anstataŭ **maldekstra** la vorton **sinistra**. Tiu vorto ne povas esti interŝanĝata ĉe aŭdo de komando kun **dekstra**. Ĉe **maldekstra** tio estus facile ebla en sportaj kondiĉoj (komandado el granda distanco, bruo de aliaj komandoj kaj signaloj, kontraŭa vento); ĉe **sinistra** la forgluto de sia ne kaŭzus miskomprenon. Mi scias, ke la sistemaj kontraŭuloj de E-o jam streĉe atentis je tio, ke okazu praktike grava miskompreno je **maldekstra**. Grabowski uzis en sia pola-esperanta vortaro **sinistra** en faka senco en la muziko.

Se la sportistoj bezonus nepre dusilaban vorton por **maldekstra**, oni devus uzi **lefta**, kiu estas preskaŭ same internacia kiel **sinistra**.

6. E. D. Durrant en interesa artikolo (»Eo en milita uzado« — en la »Eo Internacia«, SEP-OKT 40, p. 133 kaj 139) esence pritraktas la uzadon de E-o en »la frazoj kaj vortoj uzeblaj por ordonoj kaj komandoj«.

Laŭ li, necesas, kiel en naciaj lingvoj konformiĝi al tri postuloj: »klareco, minimumeco kaj elparolebleco, tiel ke la ĉefvorto estu stakate kaj tranĉe emfazbla. Plej ofte komandoj dividiĝas en du partoj; atentigo kaj ordonvorto. La supraj postuloj estas ĝenerale nur atentigeblaj per forlaso de la gramatiko kaj ordinara lingvouzo.« Kaj li donas jenajn ekz-ojn: »Formu... **vic!** (Enviciĝu!); »Ek... **marŝ!** Ploton... **halt!**«⁴⁾ »Un, du, un', du« ktp...

⁴⁾ Kp. la Zamenhofan: Scioj estis instruataj al li sub la komando »**Marŝ!**« »**Halt!**«

Alia ekz-o povus esti: »Kap... **deks!**« (dekstren turnu la kapojn!).

Tamen, pli detalan pritrakton de la demando **dekstra-maldekstra** li prezentas jene:

Generale mi malemas aparteni al la skolo de **mal-**foriguloj, sed... konfuzo inter la du vortoj povus esti grandajn danĝerojn. En nia movado ekde la fruaj tagoj diversaj solvoj estas proponitaj, kiel **link-**, **lef-** kaj **sinistr-**... Analizi ĉiujn kaŭzojn (kial la E-istoj ne enkodukis vorton por anstataŭigi **maldekstra**) ne estas facile, sed verŝajne unu el la plej gravaj estas tio, ke ĝis nun Eo ludis plej ageman rolon en la literaturo kaj familiara konversacio. En la regnojn de sporto, disciplinita komuna agado kiel gimnastiko kaj atletismo, aŭ aviado kaj militado ĝi ankoraŭ ne aktive penetris; kaj estas ĝuste en tiaj kampoj de uzado, ke la difektoj de **maldekstra** akre leviĝas.

... Kiel tute persona prefero mi elektas **link-** por la celo de ĉi tiu artikolo, ĉar mi opinias, ke ĝi posedas ĝuste tiajn klarecon kaj minimumecon kiajn postulas la bezonoj de milita fakuzo. ... **sinistra** ... ne estas tiel bona, unue ĉar ĝi havas tro da silaboj, kaj due, ĉar en certaj grandaj naciaj lingvoj la radikoj alprenas la nuancon de aĉeco.

... Ni pensu pri serĝento bovovoĉa kaj disciplinema, kiu fortege kaj akre elbuŝigas siajn komandojn. En lia buŝo eĉ **dekstra** suferos kripligon, ... fariĝos kutimo uzi stumpformon por eviti la efikon de la kvar konsonantoj **kstr** (kiuj cetere neniom da malfacilo kaŭzas en la ordinara vivo). Eble estus plej bone uzi jam dekomence stumpformon **deks**, kiu fontas el la komuna vorto, kaj konformiĝas al la diversaj postuloj supre menciitaj.

La aŭtoro finas sian artikolon per alvoko al opini-esprimado.

7. En la enkonduko de sia »Aeronaŭtika Terminaro« (U.E.A., 1941) la sama E. D. Durrant komentas:

Alia ennovaĵo estas **lefta** kiel alternativo por **maldekstra**. La kialo estas, ke tre necesas forigi ian danĝeron de konfuzo ... dum radiofoniaj interparoloj, kiam miskompreno povus kaŭzi la plej gravajn sekvojn. ... La problemo tre evidentiĝis dum la preparado de la pasintjare eldonita Armea Terminaro. Artikolo mia en »Eo Int.« elvokis korespondaĵojn, kies plimulta opinio favoris la ideon de **lefta**, kiu ne nur fontas el la angla, sed ankaŭ similas al la ekvivalento por maldekstra en la ĉefaj slavlingvoj.

8. En recenzo aperinta en la »Eo en Skotlando« (MAR 51, p. 5) pri la »Marista Terminaro« (U.E.A., 1950), Reto Rossetti skribas: »mi mem emas proponi **goŝa**«.

9. Ĝenata de la dusilabeo kaj dusignifeco de **sinistra** Albault uze proponas la formon **sinstra** («Eo et Culture» 1955, p. 171 kaj pli poste: »Norda Prismo« 1957, n^o 1, p. 42). Kalocsay plurfoje uzas tiun formon, unuafoje en »La Nica Lit. Rev.« (1958, p. 222).

10. D. R. Duncan, en sia »Angla-E-a Kemia Vortaro« (B.E.A., 1956) proponas la tradukon de la scienca prefikso angla **laev-** aŭ **levo-** per la esperanta prefikso **levo-**.

11. Sekve al recenzo, en la »Brita E-isto« (JUN 57, p. 90) pri la »Fervoj-Teknika Leksikono Franca-Esperanta« (1955) de A. Blondeaux, kiu sur p. 2 proponas **lefta**, aperas diversaj intervenoj en la sama gazeto (SEP, OKT, NOV, DEC 57).

En sia recenzo E. M. Rosher kritikis **lefta**, kiel ne sufiĉe fonetike distanca de **dekstra** (samam e kaj t). Ni resumu la intervenojn jene:

lefta, laŭ la ĝenerala opinio fonetike ne taŭgas.

lefa estis iom uzata de iuj rusoj 20 jarojn pli frue laŭ memoro de Reto Rossetti, kiu raportas, ke oni cetere jam proponis **linksa**, **sinstra**, **goŝa**, kaj ke li foje vidis **lifa**⁵⁾.

C. M. Houghton protestas, ke **linksa** devus esti **linka**⁶⁾, **kesinstra** devus esti **sinistra** kaj fine ke **goŝa** havas ankaŭ alian signifon⁷⁾, kaj sekve li proponas la mallongigon de maldekstra, nome **malda**, kiun Rossetti trovas atentinda.

Albault raportas la opinion de ing. Roelofs (fonetika eksperimento de Roma Radio), laŭ kiu **goŝa** estus fonetike nesuperebla; kaj li mencias, ke **levula** internacie troveblas en sciencaj vortoj.

12. En 1960. John Francis uzas **lifa** en novelo aperanta en lia kolekto »Vitraro«. Temas, dum la milito, pri bombaviadistoj kaj venas la urgaj ordonoj (p. 35 kaj 36)

»Dekstren, tenu. Lifen, lifen tenu«.

Kiel efikus **maldekstren** en tia kunteksto? Precipe, se anstataŭ literaturo (memoro pri realaĵo), temus pri vivo kaj ŝtalo?

12. La redaktoro de la »Monda Kulturo« (Printempo 66) skribas pri la danĝero de la »rutina paro **dekstra-maldekstra**«: beletristoj jam proponis

⁵⁾ Aludo al novelo de Francis, kiu kreis la formon **life** elde **lefe** (verŝajne pro tio, ke **lifen** pli sonoras, pli glate fluas ol **lefen** (?)).

⁶⁾ Sed bedaŭrinde **linko** estas bone konata sovaĝbesto: kion signifus **linka okulo**?

⁷⁾ En la franca **gauche** signifas ankaŭ **mallerta**.

12-on da sinonimoj, »dum aliaj fojè uzis spritajn elturniĝojn (kiel ekz-e Marjorie Boulton sur nia paĝo 143: dekstren, reen)«. Kaj li aldonas:

Estas granda tempo, ke ni unuiĝu kaj adoptu unu formon, ĉu liva, goŝa aŭ sinstra. En la nuna stadio tio estas la afero ĉefe de niaj verkistoj kaj tradukistoj: ni nepre ne atendu ĝis kiām povos okazi akcidentoj.

14. Ŝajne, post 1950., la plimulto de la Eo-naciaj vortaroj registras la vorton **sinistra**, sed laŭ la dana (53: Friis) ĝi signifas nur **malbonsigna**, dum laŭ la sveda (54: Nylén) kaj la pola (59: Michalski) nur **maldekstra**.

Tamen, sekve al la franca (57: Waringhien) la plimulto indikas ambaŭ signifojn (hungara 61, japana 63, bulgara 63, finna ĉeĥa 64).

El 13 vortaroj nur 4 mencias nenion (nederlanda 52, hispana 59, serbo-kroata 59 kaj angla 67), dum la pola kaj la hungara aldonas al **sinistra** respektive ankaŭ **lefta** kaj **lifa**.

La problemo estas do aktuala sed ne solvita: unuanimeco ne ekzistas. Plie estas dube, ĉu la fonto de **sinistra** estas multe pli larĝa ol la nura »Parnasa Gvidlibro«.

15. Apartan mencion pri maraj terminoj ni donu ĉi tie.

En 1908. Rollet de l'Isle sur la paĝo 29 de sia »Provo de Marista Terminaro« proponas uzas la terminojn **verda flanko** kaj **ruĝa flanko** kaj la ordonojn **verden!** kaj **ruĝen!**

Leŭtenanto Bayol, sur la paĝo 109 de sia »Esperanto et Croix-Rouge« citas tiujn du terminojn.

Fine en 1950. la »Marista Terminaro« de Peter Clissold reprenas tiujn du bonajn terminojn: p. 14: **ruĝa (maldekstra) flanko; verda (dekstra) flanko**. Ili aludas la kolorlumojn, kiujn uzas ĉiuj ŝipoj laŭ internacia konvencio. Paralele, li citas la pli-malpli internaciajn terminojn **babordo (maldekstra aŭ ruĝa flanko)** kaj **tribordo (verda)**, kiuj intertempe penetris en la lingvon kaj estas troveblaj en ĉiuj vortaroj. Sed li komentas ke tiuj du vortoj estas ne-dezirindaj pro troa intersimileco.

Ĉiuokaze, ni povas nur aldoni, ke tiaj terminoj, eĉ se tre oportunaj por maristoj, ja ne povas akiri uzeblon ekster la mara medio. Aliparte, malgraŭ la diro de Saussure (vd. pkt 1.), mi trovis nenion alian en la »teknikaj vortaroj militistaj« de la epoko krom la ĉi-supraj terminoj.

*

* *

Kritika studo de la proponitaj formoj.

Ni jam eliminis formojn kiel **ruĝen**, kiuj povas utili nur en limigita medio; ni eliminu ankaŭ **malda**, ja inĝenia sed tro artefarita, same kiel **linksa**, kiu eĉ sub tiu derivita formo pensigus pri la **linko**, kiu en pluraj lingvoj nomiĝas ĝuste **lynx!**

Tiam restas tri grupoj da proponoj, el kiuj du devenas de latinaj vortoj kaj unu el la franca.

A) **goŝa** (el F. **gausche**) prezentas nenian internaciecon kaj estas uzata en neniu scienca vorto. Tamen ĝi posedas eminentan avantaĝon: la fonetika kontrasto disde dekstra estas evidenta kaj nesuperebla. Ĉar la franca lingvo estas relative konata, multaj, kiuj nur iomete lernis ĝin, certe konas tiun vorton.

Aliparte, almenaŭ en Esperanto, ĝi havus nur unu signifon.

B) Grupo **sinistra, sinistra**, ktp (el L. **sinister, sinistra, sinistrum**, I. **sinistra**, olda F. **senestre**, ktp)

La radiko de **sinistra** troviĝas en diversaj sciencaj vortoj. Tute aparte, pro la internacia latina anatomia nomenklaturado, ĝi estas relative konata de ĉiuj kuracistoj, ĉe kiuj sufiĉe disvastigita simbolo por **maldekstra** estas s. (konkurence kun malpli fortaj **li.** kaj **g.**).

Bedaŭrinde, ekde la latina, la vorto havas du signifojn, kaj la dua (**malbonaŭgura**) konserviĝis sola en diversaj lingvoj: A. F. H. almenaŭ. Plie, en Esperanto ĝi estas uzata ankaŭ kaj eĉ ĉefe en tiu dua signifo!

Aliparte, la vorto estas iom longa (dusilaba radiko) kaj maltrafe finiĝas per la sama literkomplekso **str** kiel dekstra. Ĉi-rilate eblas levi la demandon, kial eliminiĝis el la franca lingvo ĝuste la paro **destre-senestre**, favore al tute nova kaj ali-etimologia paro **droit-gauche!** Ĉiuokaze, fonetiko gravas!

La reduktita formo **sinistra** almenaŭ estas unusilaba kaj unusignifa. Sed ĝi konservas la saman komplekson **str**. Plie ĝi estas nur artefaritaĵo, kriplaĵo, en kiu akumuliĝas eĉ kvar konsonantoj: **nstr!** Tio ne faras ĝin eleganta kaj belsona.

Ni fine rimarku, ke **sinistra** teorie povus modifiĝi ankaŭ al **senestra, sinistra** kaj **senistra**. Sed la du unuaj jam havas klaran signifon en la lingvo (sen-estra popolo de nomadoj; sin-estra kaj malvarmsanga). Nur la lasta estus pensebla, sed ĝi ne alportus gravan avantaĝon rilate al **sinistra**. Ni diru nenion pri lasta teorie ebla modifo: **snistra** aŭ eĉ **sistra**. Ĉiuj ĉiuokaze konservas la komplekson **str**.

C) Grupo de la teoria ***leva**.

Al tiu grupo apartenas la formoj **lefa, lifa, liva kaj levula**, same kiel la prefikso **levo-**. Praktike, eblas tie aldoni **lefta**.

Nu, se ni esceptas **lefta** (el angla **left** kun tute alia etimologio), kaj se ni flankenmetas **levula**, kiu riskus konfuzigi kaj ne estus oportuna, ni troviĝas ŝajne antaŭ almenaŭ pra-eŭropa etimo, kiu unue kondukas al la teoria Esperanto-formo ***leva**. Ni efektive havas la latinan **laevus, laeva, laevum** kaj eĉ la helenan **laios, laia, laion** (devenanta de pli frua **laiwos**).

La sama radiko estas retrovebla hodiaŭ en la slavaj lingvoj:

R. **levyj**, Pl. **lewa**, Ch. **levy**, Sb-Kr. **levi** kaj Bl. **lâv** (pr.: ljav).

Fine, la sama radiko estas sufiĉe uzata prefikse en internaciaj sciencaj vortoj: **lévo-** en la franca kaj **levo-** en la aliaj latinidaj, **levo-** aŭ **laevo-** en

la angla, **Lävo-** en la germana, kaj cetere ankaŭ **levo-** en la rusa, **lävo-** aŭ **levo-** en la bulgara ktp... Tiu prefikso plej ofte — sed ne ekskluzive — estas uzata en kemio: ekzistas tuta serio da substancoj, kiuj distingiĝas inter si per sia konduto al la polarizita lumo; parto devias ĝin dekstren (al la **dekstro**): ili estas **deskstroĝiraj**; la aliaj devias ĝin maldekstren: en la diversaj lingvoj oni nomas ilin ĝenerale **levogyr-**. En la nomeklaturon oni distingas ilin per la prefikse uzataj **dekstr(o)** kaj **lev(o)**.

Evidente, estus oportune, se en tiuj vortoj, kaj en diversaj similaj de la diversaj kampoj de scienco kaj tekniko, estus uzata ne nur la radiko **dekstr-** (kaj ne povas esti uzata alia), sed ankaŭ la aliloke uzebla vorto por **maldekstra**, anstataŭ la aparta prefikso **levo-** de Duncan, kiu kapablus utili nur en tiu kemia uzo.

*

* *

Resume, evidentas, ke la formo ***leva** estus la plej bona, vidpunkte de etimologio, internacieco kaj uzateco en sciencoj. Bedaŭrinde, tiu formo ne estus oportuna en nia lingvo pro la tre konata verbo **levi** kaj ni devas do rezigne ĝin iomete modifi.

Oni jam proponis **lefa** kaj **lifa**. La unua memorigas la modifon de la tre internacia ***lavo** al nia **lafo**. Sed **lafo** respondas almenaŭ al la germana prononco, dum **lefa** al nenio. Sed kion diri pri **lifa**? El la origina formo ĝi konservas nur la unuan literon!! Ĝi do ŝajnas nepre eliminenda: la radiko estas apenaŭ rekonebla; **lifoĝira** ne estus akceptebla: la okulo kroĉiĝas al tiu granda **f** kaj ne rekonas la internacian formon.

Sed eblas pensi ankaŭ pri **liva**, kiu sonas ja agrable kaj ne tro malsimilas skribe kaj laŭorele disde la origina: **livoĝira** estus akceptebla. La okulo tuj rekonas la vortbildon; la orelo ne ŝokas la eta ŝanĝo de **e** al **i**. Cetere »bezono leĝon ne obeas«: ĝi estus la malplej granda malbono⁸⁾

Kune kun la formo **lefa** proponita de Saussure ĝi prezentas la malplej grandan modifon sed favore al **liva** plie argumentas tri nocioj: ni jam parolis pri la vortbildo; due, la konsonantoj ĝenerale restas pli konstantaj ol la vokaloj ĉe transpaso de lingvo al alia: la skeleto de la vorto do prefere restu **l-v**; fine, **i** de **liva** pli malproksimigas ĝin fonetike for de **dekstra** ol la **e** de **lefa**⁹⁾

8) Jus antaŭ ol komenci la tajpadon de tiu kompilaĵo, la hazardo min servis: mi povis paroli kun juna jugoslavo laboranta en Tuluzo de unu jaro. De li mi eksciis, ke se la serbo-kroata vorto ja estas **levi**, **leva**, **levo**, tamen en Istrio estas uzata la formo **ljevi** kaj en Dalmatio eĉ **livi**, **liva**, **livo**. Kaj tiel **liva**, ja artefarita, tamen indentas al almenaŭ unu natura formo!

9) Superpremie eĉ eblas diri, ke la unua silabo de **liva** memorigas la germanan kaj nederlandan **link**, pro kiuj estas uzata la mallongigo **li**...

Ĉu aliaj formoj eblus? Ni jam eliminis **lefta**, fonetike malpli akceptebla kaj nur angla. Ĉu reveni al la latina **laeva**, eble sub la formo **lajva**? Mi timus, ke tiaj formoj estus tro komplikaj kaj fonetike kaj grafisme; ili estus iel pezaj kaj plumpaj. Kvankam mi ne povas doni racian klarigon, tamen ŝajnas, al mi, ke ni preferu klaran kaj simplan sonoron, netan ortografion. Ankaŭ pro tio ni rezignu pri artefaritaĵoj, kiel estus **levja** aŭ **ljeva**.

Fine, ĉu eblus omaĝi la helenan per adopto de **laja**, **laea** aŭ eĉ **lea** troveblaj en kelkaj sciencaj vortoj? Laŭ mia opinio: ne! Ĉar unuflanke per unu el ili ni trafus multe malpli grandan internaciecon (ordinaran kaj eĉ sciencajn), kaj due la samaj formoj respondas en kelkaj aliaj sciencaj vortoj al ankaŭ aliaj helenaj radikoj kun diversaj signifoj (iu birdo; glata-senhara; leono ktp...)

*

* *

Resume:

El ĉiuj eblaj solvoj ĝis nun pritraktitaj, ŝajne estas atentindaj nur jenaj: **goŝa**, **sinistra** aŭ **sinstra**, kaj **liva**.

Sed el tiuj tri-kvar formoj, **liva** elstaras per sia eleganteco, per sia nekonfuzeblo kaj ne laste per sia granda internacieco: ĝi trafas ĉiujn slavojn kaj per la scienca terminologio ankaŭ la tutan okcidentan mondon.

*

* *

Apendice jen kelkaj uzo-ekzemploj:

Dekstre! Live! Liven! Dekstren! Dekstra, viva mano; dekstramana, livamana (A. lefthanded), **livamanulo, livamaneco** (R. levorukost', G. Linkshändigkeit).

Butler, en sia angla vortaro (1967), komentas ĉe **dekstra**, ke estas atentinda la propono uzi la mallongigojn **mal! dek!** por la unusilabaj komandoj: sed ve, **mal** povus mallongigi multajn nociojn kaj **deks** jam proponita de Durrant estus samtempe pli »natura«, sed ĉefe pli oportuna! Nu! Samastile ni do havus **deks! liv!** kiuj ŝajnas tute taŭgaj. Eblas rebati, ke ĝuste en la komandoj la fina **v** de **liv** estus ne tre oportuna kaj ke do **lif** montriĝus preferinda. Ja en tiu ĉi uzo, sed nure! Cetere, tio estas falsa problemo: oni skribu **deks! kaj liv!** kaj oni lasu al la bovovoĉa serĝento de Durrant la permeson sensonorigi la konsonantojn, ankaŭ la **d-on** de **dekstra**: li do akre elbuŝigos unue: **teks!** kaj **lif!**, sed pli poste... Dio soias kion...

Kaj en sciencoj?

Dekstroĝira, livoĝira estas uzataj en diversaj sciencoj kaj skeme signifas: »kiu turnas al la dekstro — al la livo«: dekstroĝira substanco ĝiras polarizitan lumon al la dekstro; livoĝiraj muskoloj turnas ambaŭ okulojn harmonie al la livo. Tiu nocioparo estas nomita: **dekstrumiga, maldekstrumiga**, ŝajne laŭ iniciato de Verax (1910), kiam kaj se ĝi estas registrita en niaj vortaroj; tio malofte okazas: 3 el la 13 kontrolitaj vortaroj (F., J., Bl.). Tiuj du vortoj ne povas esti klaraj, ĉar mem konstruitaj el **dekstruma**, kiu ja ne estas klara: ne klara ne nur pro difino, sed ankaŭ pro manko de signifo-fiksado. Plej bela prvo estas, ke Rhodes (08) tradukas **left-handed** per **maldekstruma**, dum Fulcher kaj Long per **maldekstromana**; plie, al la sama vortoparo oni nun emas doni signifon, kiun la fakuloj (botanikistoj kaj aliaj) konas inter si per siaj latinaj nomoj, nome: **dextrorsum** (el **dextro** kaj **vorsum**) kaj **sinistrorsum** (aŭ **laevorsum** malpli uzata); cetera akompanataj de **extrorsum** kaj **introrsum**. Al tiaj tute fakaj nocioj, neniel konataj en la publiko, laŭ mi necesas doni tute fakan veston: tiun, kiun ĉiu fakulo de ĉiam konas en sia fako. La derivaĵoj de **ĝiri** jam ricevis komencon de apliko; estu plia paŝo kaj ni difinu **orso** kiel »movo direkte al« kaj ni glate ricevos teknikajn vortojn: **dekstrorse, livorsa** ktp... Tamen tiun lastan punkton mi nur sugestas al la koncernaj fakuloj: ili konsiliĝu kaj decidu!

Mi finu per citado de kelkaj terminoj el farmakologio: **livoglukozano, livomepromazino**,... (livoĝiraj substancoj) kaj el medicino: **livopozicio** kaj **livorotacio, livo-angiokardiogramo**,...

EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 3/4

339.5+338.9:913.0

DUFLANKA PROBLEMO DE MONDAJ FONTOJ DE VIVRIMEDOJ

(Prelego en Internacia Somera Universitato, Helsinki, 1969.)

(D. L. Armand, Moskvo, Sovetunio)

Rapida kvanta kresko de la monda loĝantaro daŭrigas malkvietigi sciencistojn de ĉiuj landoj, ĉar fontoj de vivrimedoj de la Terglobo estas limigitaj. Ĝi servis kaŭzo por aparta diskutado ĉe Interregistara konferenco de ekspertoj pri la demandoj de racia uzado kaj konsrvado de la naturaj riĉaĵoj de biosfero estinta en Parizo en septembro de la pasinta jaro. Ĉe ĝi estis skizitaj rimedoj por preventi la krizon. Sovetia delegitaro aktive partoprenis ĉi konferencon kaj pretigis por ĝi nacian raporton, kiu estis agnoskita la plej plena kaj plej principa el ĉiuj prezentitaj. Unu el ĉefaj raportoj menditaj de UNESKO ankaŭ estis komisiita al sovetia sciencisto.

Plue mi rakontos pri enhavo de la problemo uzante materialojn de konferenco kaj miajn proprajn esplorojn.

La nuna stato

La homaro nun kreskas kun rapideco de du centonoj jare. Ĉiuminute la kvanto de loĝantoj de la Tero pligrandiĝas je 132 homoj. Tiuj ciferoj konsternas la imagon, kiam ni rememoras, ke, se tia ritmo de naskiĝoj estus daŭrintaj de la komenco de nia erao, ni nuntempe havus po deko da homoj sur ĉiu kvadrata decimetro de la firmtero.